

# TRA ALIA VOJO

Tiu ĉi artikolo estis publikigita en la revuo NIGRIZIA N. 12 (Decembro 2010)

(Mt. 1, 18- 2,12)

La granda atendo de la popolo estas pri la glora renaskiĝo de la jam establita regno de reĝo Herodo, la “regno de Izraelo”. La monarkio en Izraelo fakte daŭris nur dum la regado de tri reĝoj, poste, pro skismoj kaj interfrataj bataloj, ĝi mizere fiaskis, la nacio fariĝis facila kaptajo por ĝiaj malamikoj kaj en tiu ĉi epoko Izraelo estas subigita al la paganoj.

Ekzistas atendoj, eĉ revoj kaj la profetaĵoj ne mankas. Oni devas nur atendi la Mesion, “la filon de Davido”, por ke tiuj ĉi aferoj efektiviĝu, kaj tiam, en tiu tago, kiel jam antaŭvidis Jesaja, “*Kaj fremduloj konstruos viajn murojn, kaj iliaj reĝoj servos al vi;... Stariĝos fremduloj kaj paŝtos viajn ŝafojn, kaj aligentuloj estos viaj plugistoj kaj vinberistoj... la riĉaĵon de popoloj vi manĝos, kaj per ilia gloro vi gloriĝos.*” (Jes. 60,10; 61,5.6). Tiuj estas la promesitaĵoj. Estonteco je potenco, je regado, je lumego kaj je riĉo.

Per tiuj ĉi perspektivoj evidentiĝas ke la popolo estus havanta malfacilaĵojn por rekoni en Jesuo la atenditan Mesion. La judoj atendas la regnon de Izraelo, kaj Jesuo anoncas al ili la regnon de Dio (Mt.4,17; Agoj 1, 6). Ili atendas la alvenon de la filo de Davido, kaj Li manifestiĝas kiel filo de Dio.

Pro tio, la samaj homamasoj kiuj varme akceptis Jesuon kriante: “*Hosana al la Filo de David*” (Mt.21,9), kiam ili konscias ke Jesuo ne estas la filo de Davido, nome ke Li neniel similas la bataleman militiston en kiu ili lokis siajn esperojn de elaĉeto, ili krias al Li sian tutan malamon;” *Estu krucumita!*” (Mt. 27,23).

Kaj Jesuo mortis por esti fidela al la mesaĝo pri universala amo de Dio, temas pri universaleco kiu ne nur rilatas la amplekson de tiu amo (ĉie), sed eĉ ĝian kvaliton (ĉiujn). Ĉiuj estas celoj de la amo de Dio, neniu homo, kia ajn estas lia religia aŭ morala kondiĉo, povas sin senti ekskludita el ĝi, kiel estos asertite en la kredkonfeso de Sankta Petro “*Dio min admonis, ke mi ne nomu ian homon profana aŭ malpura*” (Ago. 10, 28).

La universaleco de tiu ĉi amo, kiu estas la gvida fadeno en la tuta vivo kaj en la instruado de Jesuo, la “*Dio kun ni*” (Mt.1,23), estas prezentata de la evangeliisto Sankta Mateo jam ekde la momento de la unua apero de la Kristo en tiu ĉi mondo pere de okazaĵo kiu estos malbone tolerata de la unua kristana komunumo, kaj ĝin tre rapide oni mildigos, moderante ĝian eksterordinaran kaj revolucionan enhavon.

Fakte la evangeliisto skribas ke “*kiam Jesuo estis naskita en Bet-Leĥem de Judujo en la tempo de reĝo Herodo, jen sorĉistoj el la oriento venis al Jerusalemo...*” (Mt. 2,1). Sankta Mateo konscias ke li estas prezentonta grandan surprizon, pro tio li enkondukas la epizodon per “*Jen!*” adverbo per kiu oni kutimas enkonduki ion neatenditan.<sup>1</sup>

La unuaj kiuj komprenas ke naskiĝis la reĝo de la Judoj ne estas la hebreoj sed la paganoj, ne la loĝantoj en Jerusalemo sed fremduloj kiuj venas el *oriento*, ne temas pri pastroj sed pri *sorĉistoj* (en la greka lingvo μάγοι) vorto per kiu oni celis indiki tiujn kiuj sin dediĉis al la okultaj sciencoj, de la divenistoj ĝis la astronomoj.

La ununura fojo kiam tiuj ĉi sorĉistoj aperas en la Malnova Testamento okazas en la Libro de Daniel, kie oni ilin kunigas al divenistoj kaj al sorĉistoj (Dan. 1,20; 2,2).

<sup>1</sup> Tio okazas nur en la greka, latina kaj itala versio de la Evangelio laŭ Sankta Mateo; fakte, en la esperanta traduko troviĝas: “Kaj tri saĝuloj”

Severe malpermesita en la Biblio (Lev.19, 26) la agado de la sorĉisto estas komdamnita per la mortigo de kiu ĝin praktikas (“Kiu lernas ion de sorĉisto meritas la morton”. Śab.B 75b) kaj ankaŭ en la Nova Testamento la sorĉistoj estas prezentataj negative (Ago. 8, 9-24); en la *Didaĥeo*, la unua katekismo de la kristanoj, la profesio de sorĉisto estas malpermesata kaj metata inter la malpermeso ŝteli kaj tiu pri abortigo (Did.2,2).

En la tempo kiam Sankta Mateo skribas per la vorto *sorĉistoj* oni celis ankaŭ la trompistojn kaj la koruptantojn.

Tio estis tro por la praa kristana komunumo. Pro tio oni prizorgis fruege specon da cenzuro rilate la epizodon, ekante de la vokmaniero: for tiu maltrankviliga *sorĉistoj*, anstataŭigata per la pli sendanĝera (kaj sensprita) *magoj*, poste por iom klopodi nobeligi tiujn enigmajn rolantojn oni donis al ili la plej gravan honortitolon (*reĝoj*). Por solvi la malprecizecon de ilia nombro oni decidis kvantigi ilin kiel *tri*, surbaze de la aportitaj donacoj. Nun jam oni devis nur ilin internaciigi (unu blankulo, unu nigrulo, la alia mestizulo), ilin bapti kiel Gasparo, Melkioro kaj Baltazaro... kaj la pupoj por la kripo estis pretaj! Tamen je malprofito de la telogio de Sankta Mateo kaj de la anonco de Jesuo.

Sankta Mateo ne celas folkloron sed li intencas fari teologiaĵon, li ne prezentas kronikon sed veron: la amo de Dio estas por ĉiuj homoj, neniu estas ekskludita de ĝi, sed estas ĝuste tiuj kiuj estas taksataj kiel la malproksimaj homoj, la ekskluditaj, kiuj la unuaj tion perceptas kaj ĝin akceptas. Dum ĉe la anonco de la naskiĝo de la reĝo de la Judoj "*kiam la reĝo Herodo tion aŭdis, li maltrankviliĝis, kaj la tuta Jerusalemo kun li*" (Mt. 2,3), la paganoj ĝojas (Mt. 2,10). Se oni povas kompreni la timon de Herodo, la senrajta reĝo kiu suspektadis pri ĉio kaj pri ĉiuj, kaj pretas murdi siajn familianojn kaj eĉ siajn gefilojn mem pro timo perdi la regnon, ŝajnas nepravigita la timo de Jerusalemo. Kio kunigas Herodon kaj Jerusalemon estas la timo perdi la povon kaj la regadon super la popolo, kaj la murdon de Jesuo Herodo ne atingos, sed ĝin atingos la Ĉefpastro (Mt. 26,65-68).

Super Jerusalemo, la sankta urbo kiu rifuzis sian Sinjoron, neniam brilos la stelo, kiu, male, gvidas la sorĉistojn. Kaj la resurektinta Kristo neniam aperos en Jerusalemo, la urbo kiu murdas la profetojn kaj ŝtonumas tiujn kiujn la Sinjoro sendas (Mt.23,27), sed por lin vidi oni devos foriri el ĝi kaj supreniri al Galileo, la landlimo de la pagana mondo (Mt. 28,9.16). Pro tio la evangeliisto skribas ke la sorĉistoj, "*avertite de Dio en sonĝo, ke ili ne iru returne al Herodo, foriris per alia vojo al sia lando*". (Mt.2,12 ). "*Tra alia vojo*" tiu ĉi estas tre malofta dirmaniero, kiun en la Biblio oni uzis por indiki la forlason de la sanktejo en Bet-El, la "Domo de Dio" (1 Reĝ. 13,10), kie oni ne plu adoris la Sinjoron sed oni adoris la oran bovidon (1 Reĝ. 12,25-33) kaj kiu pro tio ĝi fariĝis Bet-Aveno, "Domo de peko" (Hoŝ. 4, 15), kiel la templo de Jerusalemo kiun la avido kaj la dezirego de la religia institucio transformis de domo por preĝado al "*kaverna de rabistoj*"(Mt. 21,13).

Sed la plano de Dio pro tio ne estas nekontentigita. Se la pastrta kasto rifuzis Jesuon "*La regno de Dio estos prenita for de ĝi, kaj estos donita al nacio, kiu liveros ĝiajn fruktojn*". (Mt. 21, 43), kaj tiu ĉi popolo konsistas el sorĉistoj alvenintaj el Oriento. Estos la paganoj kiuj agnoskos Jesuon en lia dia kondiĉo ("*ili adorkliniĝis al li*" Mt. 2,11) kaj pere de iliaj donacoj ili eniros partopreni en la plano de Dio por la homaro: ilia regno. La tri karakterizaĵoj kiuj igis Israelon privilegian popolon ĉar ĝi estis la pastra, geedza kaj reĝa popolo, nun tiuj ĉi karakterizoj transiras al la paganoj. Sankta Mateo prezentas tion pere de la donacoj de la oro, de la incenso kaj de la mirho. Oferdonante al Jesuo la oron kiu simbolas la reĝecon la sorĉistoj lin aknoskas kiel reĝon. La regno de Dio rifuzita de la Judoj nun estas akceptata de la paganoj. Apartaĵo de la pastra servo estis la ofero de la incenso, ĝi estis ago ekskluzive destinita al la pastroj de Izraelo (1 Sam. 2,28; 2 Kro. 26,18). Nun ankaŭ la paganoj oferdonas incenson kaj ankaŭ ili apartenas al pastra popolo (*vi estos por Mi regno de pastroj*, El. 19,6). La profetoj bildigis la interligon inter la Sinjoro kaj Izraelo kiel geedziĝon en kiu Dio estis la edzo kaj Izraelo estis la edzino (Jes. 54,5; Hoŝ. 2,4), kaj la mirho estis la parfumo de la edzino (Psa. 45,8; Prov.7,7; Kan. 1,13; 3,6; 5,1.5). Por Sankta Mateo nun ankaŭ la paganoj apartenas al la geedza popolo de Dio, kaj Lia amo estas por la tuta homaro.

Alberto Maggi